

Promene tra *MUGGIA*

Kiam oni vizitas *Muggia*-n, troveblas ĉie spuroj pri la Venecia regado: ekzemple en ties interdomaj stratetoj, ege mallarĝaj, nomitaj "*calli*" kaj en kelkaj, tre belaj domoj.

Tipa ekzemplo de gotik-venecia stilo estas la Ĉefpreĝejo (*Duomo*) de Sanktaj Johano



kaj Paŭlo, konstruita sur antaŭa preĝejo de la 12^a-13^a jarcentoj. La aktuala aspekto datiĝas en periodo inter la jaroj 1410 kaj 1467-1469. Rimarkinde belas la triloba fasado, el blank-ruĝeta ŝtono, donanta elegantecon al la tuta strukturo: krome, ĝi estas ornamita per fajne delikata roz-vitraro kun skulptaĵo de Madono kun Infano. Sur la pordego staras luneto kun reliefoj de Johano kaj Paŭlo adorantaj la Triunuon. La interno estas trinava, kun vastaj duonarkoj, kiuj malkaŝas la romanikan originon de la konstruaĵo. En la 15^a jarcento ĝi estis refarita kaj ĝuste el tiu ĉi periodo estas la fresko-fragmentoj ankoraŭ nuntempe videblaj: unu el tiuj reprezentas Sanktan *Barbara*-n. Interesaj kelkaj pentraĵoj datiĝantaj el 1600, laŭ skolo venecia. Inter aliaj artverkoj, admirindas kelkaj mebloj kaj valora religia arttrezoro (hostio-montriloj, kalikoj ks, de la 14^a ĝis la 19^a jc-oj).

Maldekstre de la Preĝejo, la Palaco de la Rektoroj, refarita en 1852 kaj komplete restaŭrita en 1934, konservas sur la fasado triarkajn fenestrojn, emblemojn de la plej gravaj, nobelaj familioj, memorŝtonojn kaj la leonon de Sankta Marko (1444).

Indas vizito de la Preĝejo Sankta Francisko, el la 15^a jc, unika ekzemplo en la tuta triesta teritorio pri franciskana arkitekturo, situanta interne de la urbeto. Ĝia fasado, kabanforma kaj masonita, estas ornamita per pintarko kaj, en ties luneto, estas reprezentita Madono kun la Infano (15^a jc).

Interne, interesaj pentraĵoj pri Madono kun mamsuĉanta infano (14^a jc) kaj la Di-Patrino kun zono, de la veneta pentristo *G. Liberti* (17^a jc), tabulpentraĵo ene de baroka altareto, kaj, el sabloŝtono, Madono kun Jesuo surgenue, farbita, el la dua duono de 15^a jc, probabla verko de loka majstro, inspiriĝinta al norda modelo.



La romanika Baziliko de Sankta Maria Ĉieleniranta, en la malnova, monteta parto de *Muggia*, datiĝas de la 13^a jarcento. En ĝia interno, trinava, elstaras ambono (predik-ejo) el la 9^a jc, dum sur la muroj kelkaj freskoj, verkoj de diversaj artistoj sed samskolanoj, rakontas la Historiojn de Kristo kaj de la Sankta Virgulino, prezentas la Martiriĝon de Sanktaj *Stefano* kaj *Lorenzo*, kaj plurajn figurojn de Evangeliiistoj, Profetoj kaj aliaj Sanktuloj. La freskoj, rilataj al historioj de la Virgulino, estas datitaj je la 12^a jarcento.

Ĉe la maro, jen malgranda fiŝkaptista haveno, de kie videblas mezepoka kastelo, konstruigita en 1375. Ĝi estas vizitebla, post interkonsento kun la proprietuloj.

Por admiri *Muggia*-n, de la mara flanko, kaj por ĝui panoramojn de la marbordoj triestaj kaj istriaj, konsilindas enŝipiĝi ĉe la albordiĝejo flanke de la Mara Stacidomo per la motorŝipo "Verda Delfeno".